espéranto Provence

kvaronjara gazeto de la Provenca Esperanto-Federacio n° 112 - printempo 2018

federacia retejo
http://www.esperanto-provence.org
nia federacio sur Facebook
http://www.facebook.com/esperantoprovence

prezidanto
Pierre Oliva
Eden Park n° 99
2772 Montée du Vieux Camp
83330 Le Castellet
06 76 55 57 23
nlpolecamp@gmail.com

aliĝkotizo (kun la gazeto)
6 €
ĉeko al :
"Espéranto-Provence"
pere de via loka asocio
aŭ sendota al la **kasisto**
Nicole Lafitte
Eden Park n° 99
2772 Montée du Vieux Camp
83330 Le Castellet
nlpolecamp@gmail.com

sekretario
redaktoro kaj enpaĝiganto
Pascal Vilain
61 Montée du Castelar
83460 Taradeau
06 42 19 68 51
pascalvilain83@gmail.com

limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta n° 30-a de junio 2018
bonvolu sendi al la supra retadreso
><><
antaŭdankojn pro viaj kontribuaĵoj

Vorto de la Prezidanto

Kian vintrofinon kun pluvaĉoj ni ĵus travivis! Malgraŭ tio, la Mediteranea Esperanto-Semajno feliĉe estis sukceso kun denove granda nombro da partoprenantoj; dankegon al la organizintoj!
En nia membrokunveno partoprenis sufiĉe multnombraj federacianoj, kiuj anstataŭigis la tiutagan veteraĉon per bona etoso kaj efika laboro. Nia salono estis jam iomete printempa.
Dum la pasinta jaro, nia federacio denove tre bone funkciis; pluraj komitatanoj multe laboris diverskampe.
Ĉiuj ni pensu nun pri la eventoj okazontaj en la printempo kaj somero. Ili estu efektive sukcesplenaj, por ke nia federacio pli kresku.

Pierre Oliva

Federacia agado

La 25an de februaro, okazis en *Les Issambres*
la Ĝenerala Membro-kunveno de nia federacio.
Ĉiu el vi, kiu disponas pri retadreso, ricevis la protokolon de la kunveno. Se vi ne uzas komputilon kaj ŝatus ricevi paperan version de tiu protokolo, ne hezitu tion peti de la federacia sekretario.
(kontaktindikoj en la apuda kolofono)

Ĉu vi ne forgesis pagi la aliĝkotizon al *Espéranto-Provence* por 2018?
Se tiel estas, bonvolu tuj sendi 6 € al *Nicole Lafitte*.
(adreso en la apuda kolofono) - Dankon!

Esperanto en lernejoj de la PACA-regiono

Danke al la agemo de kelkaj federacianoj, pluraj junuloj de nia regiono lernas nian lingvon aŭ konatiĝis kun ĝi okaze de prezentado.

Supera lernejo *Méditerranée* en *La Ciotat* (13)

12 novaj lernantoj eklernis Esperanton. La lernej-estraro jesis pri la estigo de la kurso, je la tagmeza manĝotempo. La kursoj estas gvidataj de *Renée Triolle* kaj la dokumentistino. Ili okazas dufoje monate krom dum la ferioj.

Baza lernejo *Mi-chaussée* de *Briançon* (05)

La 17an de oktobro 2017, Esperanto estis prezentita al du klasoj *CM2* de ĉi tiu lernejo de la departemento *Hautes-Alpes*.

Helpe de kolegino, la instruistino, *Élodie Hollard*, kiu zorgas pri kvindeko da lernantoj, instruis la lingvo-bazojn al parto de siaj lernantoj per ludo afable pruntedonita de *Marie-Sylvie Julian*, el *Grenoble*, dum *Monique Arnaud*, el la Esperanto-klubo de *Gap*, pre-zentis la lingvon per lumbildaro al la cetero de la lernantoj. Kaj inverse poste.

ekspozicio pri Esperanto afiŝita sur muro de la ĉefa lerneja koridoro

Supera hotellernejo de *Gap* (05)

Kadre de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, la 21an de februaro, *Monique Arnaud* prezentis Esper-anton al 30 lernantoj de la unuanivela klaso.

La prezentado tiel plaĉis al la instruistino, ke ŝi proponis al *Monique* reveni la 12an de aprilo.

La lernejestrino intencas venigi ĵurnaliston kaj mem partopreni en la evento.

Meza lernejo *Le Petit Prince* en *Gignac-La-Nerthe* (13)

Eric Streichemberger estigis Esperantan klubon en sia lernejo ekde la komenco de januaro, kun ĉirkaŭ 20-25 lernantoj. La kurso okazas unu fojon semajne dum la tagmeza manĝotempo.

Meza lernejo de *Saint-Bonnet en Champsaur* (05)

La 22an kaj 23an de februaro, *Monique Arnaud* renkontiĝis kun lernantoj de du klasoj (1a kaj 2a niveloj). Ĉar oni jam informis ilin pri la lingvo, ili iom praktikis pri vortfarado.

Plia interveno okazis la 13an kaj 16an de marto kun du aliaj klasoj.

Monique dum sia prezentado

Disdonado de *"Le Monde de l'Espéranto"* al lernejoj de la *PACA*-regiono

Renée Triolle regule provizas la *CDI* (dokument-kaj-informejoj) de lernejoj - 3 mezaj kaj 2 superaj - en *La Ciotat*. Ŝi same faras en kelkaj superaj kaj altaj lernejoj en *Marseille*.

Rosy Inaudi zorgas pri disdonado al 5 mezlernejoj en sia vivregiono.

Antaŭ kelkaj semajnoj, *Pascal Vilain* donacis la lastan numeron de la revuo al lernejoj de *Dracénie* (regiono de *Draguignan*): 7 mezaj kaj 4 superaj. Kelkaj petis, ke li prezentu Esperanton al klasoj.

Tio verŝajne efektiviĝos.

El la regionaj asocioj

13 - Espéranto - La Ciotat

La kluba membro-kunveno okazis en *CIQ-Fontsainte* la 17an de januaro, antaŭ gustumado de reĝa kuko.

*****

La 24an de januaro vizitis la klubon *Catherine Kremer*, profesia ĉiĉeronino en la batal-kampoj de *Verdun* kaj apudaj fortikaĵoj.

Catherine Kremer

Bela okazo interŝanĝi pri paco kaj milito, ne nur la Unua Mond-milito, kun informoj, anekdotoj kaj precizigoj, sed ankaŭ en Alĝerio, Azio, nuntempaj ks. por konkludi, kiel Tolstoj en la "Rakontoj pri Sebastopolo", ke ĉar ĉiuokaze decidas la diplomatoj kaj politikistoj, prefere duope batalu volontuloj dum la diskutoj, kaj tiel saviĝu la kompatindaj popoloj.

*****

Reklamo en loka informilo

neatendita reklamo pri Esperanto aperis en informilo pri "Festival Golfe d'Humour", kiu okazos en La Ciotat la 25an kaj 26an de majo

Tago de la Gepatra lingvo

Esperanto valorigas kaj defendas ĉiujn lingvojn sendepende de ilia statuto, kiu ofte dependas nur de la ekonomio kaj graveco de la lando.

Kiel kutime, *Espéranto-La Ciotat* partoprenis en tiu evento, organizita de UNESKO, la 21an de februaro.

Venis filmisto de loka televido (*TV13600,* por *La Ciotat* kaj orienta *Marseille*). La filmo estas spektebla ĉi tie.

Bedaŭrinde, tre malmulte da homoj vizitis (5 esperantistoj, i.a *Loukie* el Nederlando), unu Germano kaj 3 aliaj "eksteruloj". Tamen tre interesa vespero.

pri la tri eventoj raportis R. Triolle

13 - Centre Culturel Espéranto-Marseille

Enmanigo de diplomoj al sukcesintoj

En Marsejlo, la 6an de februaro, estis disdonitaj la diplomoj de Franca Esperanto-Instituto al *Rosie* kaj *Marc*, kiuj, kiel *Victor*, trapasis kaj sukcesis la duagradan ekzamenon.

Bela okazo memorigi la laboron de la klubo: varbado por grupa kotizo (al Marsejlo, Provenco kaj *Espéranto-France*); distribuo de la revuo *"Le Monde de l'espéranto"* al la fakultatoj kaj kelkaj mezgradaj kaj superaj lernejoj; registrado de la dialogoj de la noveldonita Metodo 11 kun la voĉoj de *Thierry* kaj *Flavie*; partopreno kaj premiigo en la internacia filmkonkurso "Teo kaj Amo" kun filmeto de *Chantal* kaj *Marc*; monata kunveno en *Équitable Café* por lingva vespero, kiu permesis kontakton ĉefe kun junuloj; nedeviga kurso al lernejanoj de la 6a klaso en mezgrada lernejo *Jules Ferry*.

raportis R. Triolle

83 - Esperanto-Klubo Saint-Raphaël

Reĝkuka festo kaj ĝenerala membro-kunveno

Jam de jaroj, por la klubanoj, estas plaĉa dato: tiu, fine de januaro - ĉijare la 25an - kiu kunigas plurajn el ili ĉe *Monique* kaj *Pierrot Prezioso* por la tradicia reĝkuko. Kelkaj venas eĉ antaŭtagmeze por havi la eblon kune babili - kaj tagmanĝi - en amika etoso.

Sed rapide venas tempo por iom pli serioza momento: je la 15a komenciĝas la membro-kunveno, kiu kutime pritraktas ne nur faritaĵojn, sed ĉefe planitaĵojn, i.a. la venontan printempan piknikon, la septembran partoprenon en la foiro de associoj kaj la organizadon de la sekva M. E. S. en *Les Issambres*.

Mediteranea Esperanto-Semajno 2018

100 samideanoj el 10 landoj kune pasigis tutan semajnon ĉe la Mediteranea marbordo: Esperanto vivas, ĉu ne?

Du partoprenintoj, *Roselyne Favier (1)* kaj *Martine Demouy (2)*, rapide sendis al la gazeta redaktoro sian raporton pri la staĝo. Dankegon al ambaŭ !

(1) **Pri M.E S., kion mi povas skribi?**

La unua afero, kiu venas miamense, estas la malbonŝanco de la «nordaj» partoprenantoj kiuj, esperinte trovi sunon en tiu mediteranea regiono, estis mirigitaj pro pluvo, vento kaj eĉ neĝo, kiuj invitis sin dum la semajno.

Sed, eĉ se tiu situacio estis iomete escepta ankaŭ por mi, Provencano, tio ebligis al mi resti surloke kun aliaj gepartoprenantoj, ĉar promeni kaj turismi ne allogis min en tiaj malbonaj meteorologiaj kondiĉoj. Do, mi estis kontenta povi Esperante babili; tio helpis min progresi, kaj ĝenerale tio estas unu el miaj ĉefaj kialoj partopreni en la staĝo.

Plie, la kurso en kiu mi ĉeestis, gvidita de Kristin, estis ĉiutage riĉiga. Ĉiam, danke al la gvidantino kaj la intervenoj de la aliaj partoprenantoj, ni babilis kaj multon lernis pri diversaj temoj, kiel politiko, ekologio, familio, socio, tekniko, sed ne pri "pluvo kaj bela tempo" (tipe franca esprimo).

Vespere, pluraj interesaj kaj belegaj prelegoj estis proponitaj al ni: kun *Nina* (Rusino), ni promenis en Afriko meze de afrikaj bestoj, kaj poste en Islando, kie kompreble necesas esti pli vestita ol en Afriko!

La trian vesperon, la alia *Nina* (Polino), instruis nin pri Eŭropa bizonoj.

Alian fojon, *Kristin* (el Belgio) kaj Nina (el Rusio) donis

al ni siajn vidpunktojn pri la rusa vivo.
La antaŭlastan tagon, ankaŭ ĉijare *Jean-François Cousineau*, nelacigebla vojaĝanto, promenigis nin en Sumatro tra mirindaj pejzaĝoj.
Dum la lasta adiaŭa vespero, ni ridis spektante skeĉojn kaj miris aŭskultante ĥoruson gvidatan de *Bernard Bigonnet*. Ĝi bonege kantis, post nur kvintaga trejnado!

Dankon al ili, sen forgesi *Christine Graissaguel, Monique* kaj *Pierrot Prezioso*, ties filinoj *Marité* kaj *Josiane*, kiuj muzike dancigis nin, kaj ĉiuj aliaj bonvolemuloj.
Nun, la suno probable revenis en *"Les Issambres"*, sed la geesperantistoj foriris...
Tamen, iliaj koroj estas fortigitaj pro ĉies afableco, ĉu ne?

Roselyne Favier

kurso 1 kun Christine Graissaguel

kurso 2A kun Jarka Mala

kurso 2B kun Kristin Tytgat

kurso 3 kun Nina Pietuchowska

(2) MES 2018

Fine de februaro, ni ĉeestis la nun famkonatan «Mediteranea Esperanto-Semajno». Se vi aŭdas 'mediteranea', vi tuj pensas pri suno kaj maro! Certe la maro estis, sed tute turmentita de la ŝtormo. Kaj la sunon anstataŭis pluvo, vento kaj NEĜO! Nekredeble!
Tamen ni havis tre agrablan semajnon kun kvar diversaj kursoj, kiel kutime. Mankis la 'altnivela kurso', vera prelego, al kiu ni dum pluraj jaroj alkutimiĝis, sed ni povis alimaniere cerbumi kaj interŝanĝi, ĉar ni ofte laboris en etaj grupoj, en kiuj ni ankaŭ multe ridis. Kaj tio estas tre bona por la sano, ĉu ne?
Posttagmeze ni ne povis fari longajn promenadojn, sed ĉi-jare eblis aliĝi al koruso, kaj kelkaj el ni elektis kanti, anstataŭ promeni tra vento, pluvo, neĝo aŭ ŝtormo. Kaj tiuj bone elektis, ĉar ili havis grandan aplaŭdon vendrede vespere dum la staĝfina festeto.
Tre memorinda estas la ekskurso al Menton por admiri la belajn skulptaĵojn el oranĝoj kaj citronoj, sed ĉi-jare, sub la neĝo. Ne multaj povas fieri pri tio! Sed ni, jes!
Sabate, ĉiuj adiaŭis la aliajn, kelkfoje plurfoje, ĉar disiĝi ne estas facila afero, precipe kiam oni devas forlasi tian agrablan etoson, kia ĝi estis en MES 2018. Dankon al la organizintoj kaj ĝis MES 2019! *Martine Demouy*

ĥoruso

ekskurso

la organizantinoj, kursgvidantinoj kaj ĥorusestro estis varme dankitaj de la tuta staĝanaro

teatraĵo

muzika etoso

Eŭropa politiko pri migrado, laŭ la fundamentaj rajtoj pri protektado.

(texte de Renée Triolle - version en français sur la page suivante)

La jura fakultato de Tulono, ĉefe la centro *Jean-Claude Escarras* pri Juro kaj kompara politiko, junuloj de *Amnesty International* kaj la Inform-buroo de la Eŭropa Parlamento en *Marseille* invitis la 23an de februaro al konferenco, kiun partoprenis ĉefe anoj de asocioj kaj studentoj.
Alparolis profesoroj pri juro sed ankaŭ eŭropa deputitino (el maldekstra grupo), *Marie-Christine Vergiat*, kaj franca deputitino *Valérie Gomez-Bassac* el la nova partio "Marŝanta Respubliko". Tiu konferenco okazis la tagon post la anonco far la ministro pri internaj aferoj pri nova leĝo *"Collomb"* pri migrado.

Mi ĉeestis kun granda intereso des pli, ke tri alparolantoj citis la "lingvo-problemo-n" kiel unu el la ĉefaj kriterioj laŭ kiuj migrantoj, ĉefe el orienta Afriko, fantasmas sian estontecon en Eŭropo kaj nepre volas atingi Britujon, kies lingvon ili konas (do atendante en Kalezo) kaj ne pretas instaliĝi en Pollando aŭ Bulgario!

Kelkaj ciferoj: oni kalkulas 244 milionojn da internaciaj migrantoj (inter ili la studentoj, kiuj studas pli ol unu jaron eksterlande), t.e 3,4% de la loĝantaro (kompare kun 2,9% en 1900); 80 milionoj el Azio, 60 milionoj el Eŭropo, 35 milionoj el Afriko sed 85% migras inter la afrikaj landoj). Aldoniĝas la migrantoj pro milito en Sirio aŭ arabaj landoj sed la plimulto restas en arab-parolantaj landoj; la malgranda Libano akceptas nun tiom da migrantoj, kiom da landanoj!
Eŭropo ĉiam estis tero de migrado. La nuna problemo naskiĝis el la fakto, ke eŭropaj ŝtatoj daŭre vivas laŭ la ideo de nacioj-ŝtatoj kun landolimoj de la XVIII-a jarcento, dum pro Eŭropa Unio, la landoj ĉe la ekstero devus zorgi pri la eŭropaj landolimoj kaj solvi la alvenon de la migrantoj.

Iom pri la jura stato: migranto alvenas kaj enskribiĝas en la alvenlando (Grekio kaj Italio), kiuj ne povas fronti la alfluon. La migrantoj iras de lando al lando, petas azilpermeson (en Provenco, la prefekto de *Alpes-Maritimes* preterpasas la leĝon mem kaj resendas al Italio eĉ neplenkreskulojn).

Dum la atendoperiodo, ili ricevas loĝejon, sanservon kaj poŝmonon. Sed kiam ili ne ricevis tiun statuson de azilpetanto, ili 90% iĝas senhejmuloj. Ne ekzistas en Eŭropa Unio la samaj naciaj leĝoj pri akcepto de migrantoj, iuj landoj liveras 10% da azilpermesoj al petintoj, aliaj 80%. Pluraj proponoj estas pli humanecaj (ekzistu homaraj vizoj, estu regulaj vizoj, estu aparta traktado de la altkvalifikuloj). Sed leĝoj, kiuj ekz. fiksis la tempodaŭron por livero de respondo, prokrastigis ĝin, kiam ili jam ekzistis. Tiu politiko riĉigas la trafikantojn (kostas 10 ĝis 12 000 eŭrojn por veturi de Kalezo al Britio...) kaj ankaŭ la ŝtatojn: Eŭropo pagas Turkion, por ke ĝi "konservu" la migrontojn, kaj la prezidento *Erdogan* ŝantaĝas regule por havi ankoraŭ pli da mono. Ĝi same pagas Libion...

Kion fari? En la tempo de la Berlina Muro, estis 10 muroj, hodiaŭ estas 70 muroj plus multaj projektoj pri novaj. Plej bone estus helpi la landojn de elmigrado, por ke ili disvolviĝu kaj evoluu, dum la monhelpo tro ofte iĝas pruntedono, kiu altigas la ŝuldon de la evoluantaj landoj. Bone estus havi la samajn leĝojn pri la rajtoj de migrantoj aŭ eksterlandanoj (ofte tiuj tekstoj ne ekzistas en la naciaj leĝoj). Digne akcepti la homojn, ke ili vivu kun familio, laboro kaj normala salajro. Notinde estas, ke neniu el la landoj de Eŭropa Unio subskribis la Internacian Konvencion pri la rajtoj de migrantoj, eble ĉar ili anticipe scias, ke ili ne respektos ĝin?

La politique migratoire de l'Union Européenne à l'aune de la protection des droits fondamentaux.

La Provence est en première ligne en ce qui concerne l'arrivée des migrants, venus par l'Italie, soit par la côte, soit par la montagne. A l'initiative d'un étudiant africain en master2 à Toulon, le Centre de Droit et de Politique Comparée Jean-Claude Escarras, l'Université de Toulon, la Faculté de Droit de Toulon, l'Antenne Jeunes d'Amnesty International et le Bureau d'Information du Parlement européen à Marseille ont organisé une Conférence-débat le 23 février devant un parterre d'acteurs locaux, responsables d'associations et étudiants.

On ne peut plus dire qu'on ne savait pas, on sait. Mais la grande question demeure : comment mettre en cohérence les discours, les valeurs et les actes ?

Quelques chiffres : il y a dans le monde 244 millions de migrants internationaux (dont les étudiants partis pour plus d'un an) soit 3,4% de la population mondiale ; la mobilité internationale explose, mais le plus gros flux se fait entre pays en voie de développement. Sur les 35 millions d'Africains, 85% migrent en Afrique. L'Europe a toujours été une terre de migration. La député européenne Marie-Claude Vergiat (gauche unitaire) insiste sur le fait que depuis 40 ans l'OCDE promet 0,7% du PIB (en fait 0,3%) pour l'aide au développement, et donne non pas des aides mais des prêts, ce qui augmente la dette et conditionne le retour dans les traités de libre-échange. Le solde migratoire en France est presque nul, il y a surtout des Africains de l'Ouest en transit : comme ils parlent anglais, ils veulent s'installer en Angleterre... et attendent à Calais.

Quelle politique dans l'Union Européenne ?

S'il existe un vrai système de protection pour les migrants, il n'y a pas de véritable politique européenne : on reste figé dans la conception de l'état-nation et de ses frontières au XVIIIème siècle ; certains pays de l'UE (par ex. l'Italie) n'ont aucune loi nationale pour le demandeur d'asile.

Sophie Pérez, maître de conférence, présente la jurisprudence existante. Pendant sa demande de droit d'asile, le demandeur est protégé, il a droit à un logement, les soins médicaux et une somme d'argent. Mais quid lorsque l'asile est refusé ? (90% se retrouvent à la rue d'après une assistante sociale en CAO.) Le demandeur fantasme son avenir, et pour des questions linguistiques préfère aller en Angleterre ou en France plutôt qu'en Pologne ou Bulgarie ! Tous sont déçus de l'accueil en Europe.

Valérie Gomez-Bassac, maître de conférence et députée "La République en marche", constate que pendant la campagne électorale, personne n'a soulevé la question des migrants. Le projet de loi Collomb venait de sortir, mais l'idée est de bien accueillir, dans de bonnes conditions. De nombreux pays n'ont pas joué le jeu, le mécanisme de solidarité de l'UE a permis d'accueillir 30 000 personnes et non les 250 000 prévues. La France est leader des refoulements (35 000 par an).

Il y avait 10 murs à l'époque du Mur de Berlin, il y en a aujourd'hui 70 (plus de nombreux projets). Aucun pays européeen n'a signé la Convention internationale des Droits des Migrants. Dans l'UE, les migrants "réguliers" viennent à 95% d'Ukraine, embauchés via la Pologne par le dumping social. De nombreux pays pratiquent le "déstockage" de migrants, par exemple en renvoyant les Afghans dans leur pays soit disant pacifié alors qu'on sait que beaucoup seront éxécutés à leur retour. En ce qui concerne la Lybie, certains pays négocient avec les chefs de tribus et non avec le gouvernement. Bref il n'y a pas de véritable politique européenne mais un jeu de "poker menteur", et aucune solution juridique pour les personnes déboutées du droit d'asile.

Renée Triolle

Si vous désirez en savoir plus sur ce thème, vous trouverez, à la suite de la dernière page de la version numérique de la gazette, deux pages au sujet de cette conférence, avec en particulier des "liens d'intérêt pour aller plus loin".

Nun ĉi tie troviĝas tutmondeco... kaj tutmondeco...

Ni konstatas hodiaŭ disvolviĝon de tiaj tutmondigo kaj eĉ tutmondismo kiajn ni, veraj kaj originaj sennaciuloj, hezite kaj eĉ malkontente estigas. Ĉar, vidante la nuntempajn okazaĵojn - ĉiulokajn militojn, moralan senordon, amasan sendungitecon, kompatindan elmigradon, k.t.p… - ni ne povas agnoski, eĉ iomete, la grandan Ideon, kaj ankaŭ ne povas eltiri el ĝi ajnan esperon.
La kialo klaregas: tiu tutmonda projekto, kiu neniigas, detruas la naciojn, sociojn kaj homan identecon, baziĝas sur nacioj kaj esprimiĝas per naciaj lingvoj (angla, franca, rusa, ĉina, hispana: t.e. la lingvoj de la Unuiĝintaj Nacioj).
Mortiga kontraŭdiro!
Dum daŭros la trompo kaj mensogo, de tio ni rapide malproksimiĝu kaj ni agadu laŭ la jena ora regulo: «Se pacon ni volas, pacon ni preparu!»
Se sennaciecan tutmondan ordon ni volas, sennaciecon ni preparu!

Luc Barbulesco - oktobro 2017

*****

Vojaĝemaj federacianoj

De la 9a ĝis la 11a de marto, ***Alain Rémy*** partoprenis en la Festivalo *"Curieux voyageurs"*, en *Saint-Étienne*, kie li prezentis parton de sia bicikla vojaĝo 2017: Ukrainio-Rusio.
Li estis intervjuita de ĵurnalisto el *"La Tribune-Le Progrès"*.
Niaj samideanoj de *Saint-Étienne* havis budon en la festivalo.
(Sur la foto, Alain R. staras je la dua loko maldekstre).

Roselyne Favier: "Mia vojaĝo al Kostariko"

Kristoforo Kolumbo atingis la landon je loko nun nomita "Limo"... kaj nomis ĝin «Kostariko» (riĉa marbordo), rimarkinte la riĉajn ornamaĵojn de la indiĝenoj kaj la grandajn faŭnan kaj flaŭran diversecojn.

Multe pli poste, konstruado de fervojoj forte miksgentigis la regionon pro alveno de diversaj popoloj. Ne povante pagi la Usonanon, kiu mastris tiun konstruadon, la lokaj estroj donacis al li grundojn sur kiuj li kultivis bananujojn, kies fruktojn li eksportis ĝis Usono; tio multege sukcesis kaj alportis riĉecon al la lando. Ekde 1980, la fervojo ne plu funkciis ĉar tiam la prezidenta patrino posedis ŝarĝveturilojn kaj komercis per pneŭmatikoj. Do, oni anstataŭigis la trajnojn kaj tio daŭras ĉar la projekto refunkciigi la fervojan trafikon renkontas grandajn malfacilaĵojn: la vulkanoj multe difektis la fervojojn. Ĉi-tiu projekto postulus grandan sumon, kiun la lando ne havas.

Preskaŭ kvin milionoj da loĝantoj vivas en Kostariko sur 52 000-kvadratmetra areo.

La nuna landriĉeco venas de bananoj, kafo, ĉokolado, ananasoj, sukerkano kaj… ekoturismo.

Mi vojaĝis tra kelkaj regionoj kun sep aliaj (ne esperantistaj) kunuloj. Antaŭ ĉio, forirante la ĉefurbon *San Jose*, kie ni dormis la unuan nokton, ni busete trairis vulkanan montego-ĉenon (2000 m) kaj tre densan Amazonan arbaron, kie freŝdate malaperis du nesingardemaj esploristoj. Poste ni trairis bananplantejojn per *"BGV"*-veturilo, tiel nomita ĉar ĝi multe vibras pro la vojoj tre difektitaj de la ŝarĝveturiloj. *(ndlr: ĉu aludo al la Boeing TI-BGV de Air Costa Rica?)*
Kiam ni atingis varfon, oni veturigis nin per ŝipo ĝis *Tortuguero* (testud-regiono), meze de nacia akvoparko, kiun oni nomas "Amazonio de Kostariko".
Ĝi konsistas nur el kanaloj, riveroj, marĉoj en kiuj ni vidis kaj admiris plurajn specojn de birdoj kaj ankaŭ igvanojn, krokodilojn, kajmanojn, simiojn, bradipojn, tukanojn, baziliskojn kaj ranetojn, kiuj havas grandajn okulojn kaj estas emblemo de la lando.
Kompreneble, ni vizitis fakan muzeon, kiu klarigas al la

turistoj, kiel oni protektas la testudojn. Tiu akva regiono troviĝas ĉe la Kariba Maro.
Du tagojn poste, ni denove ŝipe veturis ĝis loko, kie la buseto atendis por konduki nin ĝis la vulkano *Arena* (1635 m), kiu nun dormas sed kelkfoje bruetas!
Promenante sur ĝiaj flankoj, ni vidis tapiron, krotalojn, agution, birdojn, diversajn simiojn... Sur pendopontoj ni trapasis parton de praarbaro super tropika vegetaĵaro… kaj kurante ni revenis sub tropika pluvo... por bani nin en akvo, jen varma jen varmeta, kiu venas el la vulkano.

Pli malproksime, ni vizitis la nacian parkon *"Rincon de la Viega"*, je kies mezo staras samnoma masiva vulkano; tie vivas diversaj simioj - kapucaj, hurlantaj, araneaj - mirmekofagoj, serpentoj, bradipoj kaj tricent specoj de birdoj. Ni ankaŭ observis la vulkanan aktivecon: fumaroloj kaj bolanta ŝlimo.

La 11an de decembro, ni alvenis al *Monte-Verde*, kie la vetero ĉiam estis malbela dum nia restado.
Bedaŭrinde, pro tropika ventego, ni ne povis promeni en biologia naturrezervejo. (Du ne sufiĉe atentemaj turistoj tiuepoke mortis pro arbofaloj).
Anstataŭe, ni vizitis pli ŝirmatan lokon: plantejo de kafarbustoj kaj kakaoarboj, "de la fabo al la taso".
Ĉi tiu vizito estis tre interesa, bone komentita, kleriga... kaj sekvata de plaĉa trinkado de kafo kaj ĉokolado.

Malsupren veturante, ni konstatis, ke multaj arboj falis sur la vojon. Nia veturilado poste kondukis nin ĝis riverego sur kiu ni alproksimiĝis al diversgrandaj krokodiloj. Nokte ni alvenis al nia loĝejo meze de belega florumita parko proksime de Pacifiko.

La sekvan tagon, post longa atendado pro grava akcidento sur la vojo *"Trans Amerika"* (kiu iras de la nordo de Nord-Ameriko ĝis la sudo de Sud-Ameriko), ni denove promenis tra arbaro en la nacia parko *Manuel Antonio* kie, proksime de la maro, ni vidis ne ordinarajn krabojn. Amuzitaj de kapucenaj simioj kaj procionoj, kiuj "ŝtelis" la manĝaĵojn de turistoj, ni ripozis kaj banis nin en Pacifiko.

Nia vojaĝo tie finiĝis; la sekvan tagon ni veturis ĝis *San Jose* kie, dank' al la helpo de *Diana*, nia juna gvidantino, mi povis renkonti Kostarikan esperantiston, *Hugo Mora*. Ni kune babilis "sub" la okuloj kaj oreloj de kvar kunvojaĝantoj; ili estis forte impresitaj!

Jam dum la vojaĝo mi parolis kun *Diana* pri Esperanto, ĉar por mi ŝi telefonis al *Hugo Mora* por rendevui. Ŝajnis al mi, ke tio interesis ŝin, kaj nun ŝi deziras lerni Esperanton. Por ŝi, tio estus facila, ĉar ŝi jam tre bone parolas la francan kaj la anglan, krom la hispana kompeneble. Nun, sinjoro *Mora* kaj mi "konservu unu la alian la piedojn varmaj". (sudfranca esprimo).
Tre malmulte da Esperantistoj estas nun en Kostariko, diris al mi nia samideano. Por paroli Esperante li vojaĝas; li partoprenis en la itala kongreso 2016.
Ni babilis pri lia lando, pri Francio, pri... Eŭropa Unio kaj foriro de la Angloj!
Malfeliĉe, ni devis ĉesigi nian babiladon pro la antaŭvidita vizito de *San Jose* antaŭ la flugo al Francio.
Malĝoje mi adiaŭis sinjoron *Mora*, sed ĝoje konstatis, ke du el niaj grupanoj deziras lerni Esperanton!

dekstre : Hugo Mora, UEA-delegito el Escazù (Kostariko)

Juna urbo, *San Jose* (1200 m alta) situas inter vulkanoj kaj montoj. Ĝi entenas kun sia ĉirkaŭaĵo proksimume trionon de la loĝantoj de la lando. La urbo ŝajnis al ni agrabla ĉar gaja! Tamen, nokte ĝi estas iomete senviva ĉar multe da uloj loĝas ekster la urbo. Ni vidis kelkajn belajn vojojn kun malnovaj hispanaj domoj kaj multe da vendejoj... Proksime de Kristnasko, la stratoj estis tre vivplenaj.
Pro la trafikego, ni devis frue adiaŭi nian afablan gvidantinon kaj nian ŝoforon ĉe la flughaveno... Ni devis lasi belan landon, verdan pro malsekeco, kie la energioj estas naturaj: akva, venta, vulkana. Plie, ekde decembro 1948, la armeo ne plu ekzistas; *Jose Figueras Ferrer* dekretis ĝian ĉeson (klarigo de nia gvidantino: li mem iniciatis ŝtatrenverson, do li ne deziris sperti la saman aferon)!
Tamen tiu lando, kies devizo estas *"PURA VIDA"* (pura vivo) estas ekzempla; ĉeso de mortpuno datiĝas de 1887: la prezidento "donacis" tion al sia edzino, kiu influis lin prie... okaze de ŝia naskiĝdatreveno.

Post unu monato, mi ricevis mesaĝon de Diana... en Esperanto! Ĉu ankaŭ vi, samideanoj, ŝatus vojaĝi ĝis Kostariko kaj eble, dank' al ŝi, esti Esperante gvidataj?

Roselyne F.

ZEO-oj en *PACA* > 6 - *Carpentras* (84)

Ni daŭrigas nian vojaĝon en la *PACA*-regiono, vizitante laŭalfabete la urbojn, kiuj havas Zamenhof/Esperanto-objekto(j)n. Post *Aix-en-Provence, Arles, Cagnes-sur-Mer, Caillian, Cannes*... jen *Carpentras*, en la departemento *Vaucluse*.

Ne estis facile trovi spurojn. Interreto ne helpis min, ĉifoje. Mi telefonis unue al la turismoficejo, kiu konsilis al mi kontakti la urbodomon. Tion mi faris, kaj oni donis al mi telefonnumerojn de personoj, kiuj bone konas la historion de *Carpentras*.
Unu el tiuj sciigis al mi, ke la registro pri malnovaj priduskutoj de la urba konsilantaro koncerne stratnomojn troviĝas en la urba biblioteko. Ties direktoro, S-ro *Delmas*, responde al sendita mesaĝo, disponigis al mi la trafan dokumenton pri decido de 1975 kiu atribuis al vojo la nomon : *"Rue du Docteur Zamenhof"*.
De S-ro *Bernard*, el la urbodomo, mi ricevis foton de la koncerna stratplato, kaj antaŭnelonge, mi ricevis de *Bernard Bigonnet*, membro de la Avinjona Eo-klubo, foton de la strata inaŭguro en 1975. Ĉi tiun foton afable disponigis al li *Max Claude*.
Resume : pluraj personoj afable pasigis iom da tempo serĉante por mi dokumentojn pri la ZEO de sia urbo.

Jen parto de la mesaĝo ricevita de S-ro *Delmas* :
"En réponse à votre demande, vous trouverez ci-joint la délibération du Conseil Municipal de la Ville de Carpentras en date du 5 mars 1975 donnant au chemin des Coulquières le nom de «Rue du Docteur Zamenhof», sur la proposition du Centre Culturel Vauclusien d'Espéranto. (ndlr : présentée par sa présidente, Mlle Comiti) De plus, une association espérantiste a bien existé à Carpentras, sous le nom de «Carpentras-Espéranto», mais elle n'est actuellement plus référencée dans l'annuaire de la vie associative de la ville."



Extrait du Registre des Délibérations
du Conseil Municipal de la Ville de Carpentras

SÉANCE du 5 MARS 1975

L'an mil neuf cent SOIXANTE QUINZE

et le CINQ MARS

le Conseil Municipal régulièrement convoqué par le Maire dans les délais légaux a été appelé à délibérer sur les questions suivantes :

PRESENTS : Me Maurice CHARRETIER Maire - MM.GIRARD P. ESTEVE. GRIG. FARGEPALLET. BRANCHE. REYNAUD. ADJOINTS - MM. DANIEL. ROMAN. Mme GENIN. MM. ROUX B. PEYRON. VEYRIER. CAMPOY. GRASSI. SERRETTE. BERNARD. GUINTRANDY.

ABSENTS EXCUSES : MM. MANCIP. SIMONI. GIRARD R.

ABSENTS : MM. PERAULT. ALBERT. DUGAUD.

SOUS-PRÉFECTURE 19 MARS 1975 CARPENTRAS

DENOMINATION OFFICIELLE D'UNE RUE

Rapporteur : Docteur FARGEPALLET

La Commission des Affaires Culturelles et Tourisme a été saisie d'une demande émanant de Melle COMITI, Présidente du Centre Culturel Vauclusien d'Espéranto, sollicitant l'attribution du nom du Docteur ZAMENHOF à une rue de CARPENTRAS.

Le Rapporteur propose d'attribuer le nom du Dr ZAMENHOF créateur de l'espéranto (1859 - 1917), à la partie de la route dite "chemin des Coulquières", comprise entre le carrefour de l'Allée des Tilleuls et la descente des Tanneries jusqu'au panneau "Stop" de cette voie, ainsi qu'il est indiqué sur le plan.

Le Rapporteur demande à l'Assemblée de bien vouloir délibérer sur cette question.

LE CONSEIL,

Après en avoir délibéré,

Décide :

1° - de DONNER le nom du Dr ZAMENHOF à la partie de la route dite "chemin des Coulquières", comprise entre le carrefour de l'Allée des tilleuls et la descente des Tanneries jusqu'au panneau "Stop".

2° - DIT que l'acquisition des plaques nécessaires sera faite sur le budget primitif de l'exercice 1975 - chapitre 936.22.

.../...

stratinaŭguro en 1975

nuna aspekto de la stratplato-loko

J'adresse mes plus chaleureux remerciements, pour leur aide précieuse, à Monsieur Jean-François Delmas, directeur général de la bibliothèque de Carpentras, qui m'a fait parvenir la délibération du Conseil Municipal, à Monsieur Guy Bernard, du Service urbanisme de la Mairie, qui m'a envoyé une photo de la plaque de la rue Zamenhof, ainsi qu'à Monsieur Gilbert Nicollet, de Monteux, qui m'a aimablement aidé dans mes recherches. Tous trois recevront un exemplaire de ce numéro d'Espéranto-Provence. Merci également à mes amis espérantistes Max Claude et Bernard Bigonnet pour les documents transmis ! *Pascal Vilain*

Paĝo de la komencantoj

teksto en facila Esperanto

Oni parolas ĉiujn lingvojn

Sur la pordo de malgranda franca hotelo estis skribita anonco: "Ĉi tie, oni[1] parolas ĉiujn lingvojn".
Hispana turisto, kiu malbone parolis france, demandis unue en sia[2] gepatra lingvo, hispane, poste angle kaj germane, fine en la Internacia Lingvo, Esperante.
Sed al ĉiu demando, la hotelisto respondis france: "Mi ne komprenas."
- Sed kiu parolas ĉiujn lingvojn en via hotelo?
demandis kolere la hispana turisto.
- La gastoj[3], respondis trankvile la hotelestro.

klarigoj / atentigoj

1. **oni** : pronom personnel indéfini =*" iu ajn, iuj ajn"*. Il correspond au français "on".
Il peut être utilisé au singulier : *"Oni devas ĉiam esti preta."*, ou au pluriel : *"Oni estas maljustaj koncerne ilin."* (Z) Mais le singulier est préférable.

2. **sia** : adjectif possessif réfléchi qui renvoie toujours à un sujet à la troisième personne du singulier ou du pluriel. *"La gepatra lingvo"* est celle de *"hispana turisto"*, sujet du verbe *"demandis"*.

3. **gasto** : hôte. Mais en français, l'hôte peut être la personne qui reçoit, ou au contraire celle qui est reçue. L'espéranto est plus précis : ***gasto*** = personne qui est reçue (convive, invité[e]) ; ***gastiganto*** = personne qui reçoit, qui invite. De même, ***gasti*** = recevoir l'hospitalité ; ***gastigi*** = donner l'hospitalité.

vortenigmo

trouvez un mot de 7 lettres composé de trois parties suggérées par l'illustration

Plurelekta demandaro

laŭ verkoj de Robert Llorens
eldonitaj de Espéranto-Info

1 - gramatika

a) ..... ni estos, des pli multe ni ridos.
1 - ju pli ; 2 - des pli ; 3 - des malpli
b) ..... malsano li ne povis ĉeesti la kurson.
1 - pro ; 2 - por ; 3 - per
c) Mi faras ĉion eblan, ... ke vi bone lernu.
1 - pro ; 2 - por ; 3 - per

2 - vorto-trezora

ĉ) elektu "ekscii", "instrui" aŭ "lerni" por traduki la francan "apprendre"
1 - étudier : .....
2 - enseigner : .....
3 - être informé : .....
d) elektu "akcenti", "apogi" aŭ "helpi" por traduki la francan "appuyer"
1 - aider : .....
2 - accentuer : .....
3 - une proposition : .....

Superzam'

proponita de
Jean-François Cousineau

1. Kiom da nacioj estis reprezentitaj dum la 1ª UK?
a- 20 ; b- 26 ; c- 32
2. Kiu estas la titolo de la triakta lirika dramo verkita de Baghy en 1958? a- Revo sub prunarbo ; b- Sango sub ĉerizarbo ; c- Sonĝo sub pomarbo
3. En kiu jaro aperis la 1ª disko de Kajto?
a- 1985 ; b- 1987 ; c- 1989
4. Kiomaĝa estis Zamenhof, kiam li edziĝis kun Klara Silbernik ? a- 24a b- 28a c- 32a
5. Kiu korelativa finaĵo signas kvanton?
a- am ; b- el ; c- om
6. Kiu estas la plej longa rivero en Sud-Ameriko, krom Amazono? a- Orenoko ; b- Puruso ; c- Plata-rivero

Plurelekta demandaro
1 - gramatika
a : 3 ; b : 3 ; c : 2
2 - vorto-trezora
ĉ1 : apliko ; ĉ2 : diligenteco ; ĉ3 : surmeto
d1 : taksebla ; d2 : ŝatinda ; d3 : atentinda

Solvoj de la demandoj en EP 110 aŭtuno 2017

vortenigmo
"v-en-t" + o = vento

Superzam'
1 b > Bulonjo-ĉe-Maro
2 b > Sonĝo sub pomarbo
3 b > Marita
4 a > 1887 ; 5 b > e
6 a > Kongo (4 700 km)

El la mesaĝkesto de la legantaro

Liba Gabalda
Mi kore dankas pro sendo de via gazeto, kiun mi kun intereso tralegis.
Jen raporto pri la 25a Esperanto-Semajno en *Tossa de Mar*.
respondo de la red.
Dankon pro via fideleco al nia gazeto, Liba, kaj ankaŭ pro ĉiuj raportoj viaj, kiuj bone bildigas multon, kiu okazas en Esperantio.

Roselyne Favier
Mi bone ricevis la gazeton, dankon; mi legos ĝin iomete pli malfrue.
respondo de la red.
Ankaŭ vi estas tre fidela leganto de nia gazeto; sed ne tro prokrastu la legadon!

Chantal Beaumont
Dankon!
respondo de la red.
Eĉ simpla vorteto havas la povon varmigi redaktoran koron! Mi do reciprokas la dankon!

Demouy Martine
Dankon pro la sendo de via tre interesa gazeto. Mi ĝojas, ke ni revidos unu la alian baldaŭ en *Les Issambres* kaj pli poste en Lisbono!
respondo de la red.
Nia gazeto estas ligilo inter ĉiuj federacianoj de la Provenca regiono, sed ne nur: ĝi ja vojaĝas cis (eble trans?) nialanda limo. Je la aperdato de ĉi gazeto, MES en Les Issambres estas jam for, sed ne la UK en Lisbono. Vi kaj ni antaŭĝuas, ĉu ne?

Philippe Combot
Pri la n° 110: Mi ne ricevis la gazeton je mia universitata adreso […] sed ja hejme, kie mi (rapide) tralegis ĝin kaj trovis neniun eraron. Pri la n° 111: Ĉi-foje mi ja ricevis ĝin, kaj rapide legis ĝin. La artikoloj pri Unesko kaj la universo estas interesaj. Mi vidis, ke ĝi estas sur la retejo de la federacio: tio estas tre bona afero. Mi esperas, ke oni konservos ĉiujn venontajn numerojn sur la retejo (mi eĉ ŝatus havi la tutan kolekton sur tiu loko). [...]
respondo de la red.
Pri la nericevo de la n° 110, mi vere ne komprenas. Ŝajnas, ke Sendinblue, kiun mi uzas por la sendo, ne ĉiam bone funkcias. Por la sendo de la n° 111, mi provis denove uzi gmail, kiu ĉifoje akceptis kontentige miajn multnomajn listojn.
Pri la gazetaj PDF-oj en la federacia retejo, mi povas jese respondi, kaj ankaŭ mi esperas, ke ĉiuj numeroj iam enestos. Sed por plejmulto da malnovaj numeroj, necesos longa skanado cele al enkomputiligado.

À noter sur votre agenda

dans notre fédération

mai 19 - Marseille (13) : Forum des langues du monde
juin 16 - Le Beausset (83) : examens de l'Institut Français d'Espéranto - niveaux 1 et 2 *(renseignements sur demande par courriel ou tel. au secrétaire)*
mai 13 - Fréjus (Base Nature) : pique-nique du club de Saint-Raphaël
juin *(date à préciser)* - Avignon : journée culturelle avec pique-nique
juin 24 - Les Issambres (83) Vacanciel : repas de fin d'année scolaire du club de Saint-Raphaël
juillet 1er *(à confirmer)* - Gap (05) : Fête du mouvement de la paix
décembre 1-2 : Le Beausset (83) : fin de semaine culturelle

en France

mai 10/13 - La Rochelle (17) : stage étude et tourisme
infos : leveque.franjo@gmail.com

Château de Grésillon - Baugé (49)
avril 20/28 : 8ème "Printempas"
mai 5/9 : stage de chant choral
juin 12/16 : ReVe - rencontre végétalienne
juillet/août : programme d'été
http://gresillon.org

en Europe

mai 18-21 - Zweibrücken (Allemagne)
Congrès franco-allemand-luxembourgeois
https://esperanto-france.org/
mai 19/25 - Wroclaw (Pologne)
70ème Congrès de IFEF (cheminots) - wlib24@o2.pl
juillet 28 /août 4 - Lisbonne (Portugal)
103ème Congrès Universel d'Espéranto
https://www.uea.org/kongresoj/UK
août 5/12 - Kragujevac (Serbie) : SAT-kongreso
infos : financoj@satesperanto.org